

Nature...

Ĉi-jare ni vizitos antaŭtagmeze je 9h la arbaran rezervejon 'Steenbergse Bossen' en Zottegem.

Rendevuloko:

centro de Sint-Goriks-Oudenhove (Kruiswaterplein).

... kaj kulture

Posttagmeze ni veturos al Velzeke (Zottegem) kie ni vizitos je 14h30 la Provincan Arĥeologian Muzeon (adreso: Paddenstaat 7) sub gvido de loka ĉiĉerono. Velzeke estis, dum la gaŭloromia erao, kruciĝo de gravaj romiaj vojoj ekz. inter Bavay kaj Gent kaj inter Tongeren kaj Cassel.

Praktike

La tago konsistas el gvidata promenado matene kaj posttagmeze vizito de muzeo. Eblas partopreni nur unu el ambaŭ aktivecoj. Vidu la aliĝilon.

Lokaj fakuloj gvidos nin nederlandlingve. Ni kompreneble provizos esperantlingvan tradukadon se ĉeestos alilingvanoj.

Por la antaŭtagmeza naturpromenado vi plej bone provizos vin per botoj! Sed ne timu: estas nek 'fakekskurso' nek 'sportkonkurso'. Konsideru tamen ke plejofte la promenado ne taŭgas por puŝĉaretoj.

Alportu mem vian piknikon.

La rendevulokoj estas plej facile atingeblaj per aŭto. Se tamen vi deziras veni trajne, prenu sufiĉe fruan trajnon al Zottegem kaj nepre avertu nin!

Por la tuta tago ni petas kotizon de 4 €. Ebla profito iros al la 'Naturfonduso Flandraj Ardenoj'.

Post aliĝo vi ricevos ĉiujn necesajn detalojn (inkl. vojindikojn).

Ne prokrastu vian aliĝon!

Tri bonaj kialoj por partopreni

Unue. Malkovru naturon kaj kulturon en bela flandra regiono dum la plej bela sezono.

Due. Apogu la klopodojn de la lokaj naturasocioj por konservi la ekologian kaj estetikan valoron de la regiono.

Trie. Montru al ne-esperantistoj ke la Internacia Lingvo funkcias.



‘La Flandraj Ardenoj’ estas la nomo, kiun oni donis al monteta regiono en la okcidenta parto de Flandrio, 30 km sude de Gent kaj 30 km oriente de Kortrijk.

Dum la ‘Tago de la Flandraj Ardenoj’ la lokaj naturasocioj volas konatigi la naturriĉecon de sia regiono al plejeble granda publiko. Sed la Flandraj Ardenoj ankaŭ riĉas je kulturo. Pro tio ni volas kombini la organizadon kun vizito de interesa kultura ero en la regiono.



NATURO, KULTURO kaj... ESPERANTO en la FLANDRAJ ARDENOJ

dimanĉon
la 27an de aprilo 2014



organizado:
‘LA KONKORDO’ – KORTRIJK